# INA

INTERNACIA NATURKURACA ASOCIO

2008-03

Julio 2008

ISSN-1612-7927

ina-asocio@web.de

www.esp-ina.com

€ 3,50




Bonvenon en Herzberg - la Esperanto-urbo, konferencurbo de la 3-a INA-Konfernco. Jen la inauxguro de la novaj urbaj ŝildoj. Informoj je www.herzberg.de (ankaŭ en Esperanto)

# Bonvenon al Herzberg!

***Antaŭ la komenco de la 3-a INA-Konferenco***

Estimataj membroj de INA kaj interesuloj pri naturkuracado!

Mi kore bonvenigas vin al nia konferenco, kiu ĉijare okazas en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. Per tio ni intencas subteni la ideon de la Esperanto-urbo.

Fakte ĝi jam estas tre internacia kiel vi vidas sur la titolpaĝa foto. La inaŭguron de novaj ŝildoj partoprenis la dinamika urbestro s-ro Gerhard Walter (kaŭrante, en blua ĉemizo), la lignoskulptisto (en ruĝa ĉemizo), kiu kreis la ŝildojn, kaj aliaj homoj el Germanio, Koreio, Italio, Hungario - kaj membroj de INA.

Nia konferenco estos eĉ pli internacia. Ni atendas partoprenantojn el dekkvin landoj.

Tio estas bona sukceso. Tamen mi ne povas kaŝi mian malkontentecon pri la burokrataj germanaj ŝtataj oficistoj, kiuj ne aŭ ne ĝustatempe donis vizojn al niaj membroj el Ĉinio.

Mi profunde paronpetas al niaj membroj en Ĉinio! Ilia manko en nia konferenco devigas nin al ŝanĝo de la programo. Kiel ni konferencu pri „Herbokuracado en Oriento kaj Okcidento“, se mankas la fakuloj de la oriento?

Malgraŭ tiuj burokrataj malfacilaĵoj ni ofertas al vi interesan semajnon. Se vi volas lastmomente aliĝi, telefonu rekte al mi: +49 151 58751932. Mi donos al vi ĉiujn necesajn informojn.

El la vidpunkto de la urbo kaj ankaŭ de la esperantistoj la plej grava tago estos la 12-a de julio. Tiu estas la dua naskiĝtago de la Esperanto-urbo.

Ni gratulas kaj kunfestas!

*Harald Schicke*
*Prezidanto de INA*


# Abelaj produktoj

*De Rosa Ebel, Gemanio - www.eweri.de*

## Abelvakso

La abeloj produktas vakson per specialaj glandoj: ili kvazaŭ “elŝvitas“ ĝin en formo de tre malgrandaj lamenetoj. Tia vaksa lameneto pezas 0,0008 g. Ĉe produktado de 1 g da vakso partoprenas ĉirkaŭ 150 abeloj.

Por la vaksproduktado la abeloj abunde manĝas mielon. Ilia korpo posedas la funkcion transformi la entenatajn en la mielo sukerspecojn (fruktozon, glukozon kaj sakarozon) je vakso. Por produkti 1 kg da vakso abeloj foruzas ĉirkaŭ 7 kg da mielo.



*INA-membro Kelly Londoni el Ĝimbabvo kun abelvakso*

La abelfamilio produktas nur tiom da vakso, kiom ĝi bezonas mem. Ĝi konstruas el la vakso ĉelojn por deponi kaj konservi mielon, polenon kaj reprodukti junajn abelojn.

En Mezeŭropo la ĉefperiodo por vaksproduktado estas nur aprilo, majo kaj junio. Pro tio la kvanto

de gajnata abelvakso estas sufiĉe malgranda kaj ĝia valoro tre alta.

**Ingrediencoj**: mineralŝtofoj, vitamino A kaj valoraj miksaĵoj el esteroj.



## Uzado de abelvakso

Abelvakso havas specifajn ecojn, kiujn la artefarita vakso ne posedas. Tial la abelvakso estas dezirata krudmaterialo por multaj bezonoj.

En la nuntempa mondo vakso estas vaste uzata:

★ por medicinaj celoj

★ en nutraĵproduktaj industrio

★ en kemia kaj elektra industrioj kaj por nobligi lignan meblaron.

★ en naturkosmetiko por la produktado de kosmetikaĵoj, ekz. haŭtkremaĵoj kaj lipfarboj. Ĝi protektas la haŭton kontraŭ sunradioj, malvarmo kaj ceteraj mediaj influoj, faras la haŭton mola kaj elasta.

★ en naturkuracado vakso estas multflanke uzebla (pura aŭ kombinita kun aliaj abelproduktoj) kiel interne ĉe diversaj inflamoj tiel ekstere por var-

maj bandaĝoj, plastroj kaj protektaj kremaĵoj. Vakso posedas antiseptikajn kaj inflamĝenajn ecojn, ĝi akcelas resanigon de cikatroj kaj vundokrustoj. Precipe bone ĝi efikas tiucele estante miksita kun kruda propoliso aŭ propolis-ekstrakto.

★ kandeloj el abelvakso estas ŝatataj donacoj; ili havas tre delikatan aromon kaj estas riceveblaj en plej diversaj formoj.





## Preparo de kalendula oleo

1. Kvin gramojn da sekaj kalendulaj petaloj oni metu en fermeblan vitran vazon kaj superverŝu per 250 ml da oleo. Oni fermu la vazon kaj lasu mazeri la miksaĵon ĉirkaŭ tri semajnojn. La oleospeco dependas de via bontrovo, ekz. olivoleo.

2. La pretan kalendulan oleon oni filtru, verŝu en malhelvitran botelon kaj etikedu ĝin (la enhavo kaj la dato).

## Preparo de kalendula ŝmiraĵo.

1. 200 ml da kalendula oleo kaj 15 gramoj da pura abela vakso oni metu en poton aŭ glason kaj varmigu ilin metinte la poton en varmegan akvon.

2. Post kiam la vakso fandiĝis en la varmiĝanta oleo, oni bone trakirlu ĝin kaj elprenu la poton el la akvon.

3. Lasu la vakso-olean miksaĵon iomete malvarmiĝi kaj miksu en ĝin ĉirkaŭ 10 gutojn da propolisa tinkturo (laŭ deziro oni povas aldoni iom pli multe da propolisa tinkturo).



*Maldika vakstavolo*

4. La pretan ŝmiraĵon oni dismetu en speciale por tio destinitajn potetojn, bone fermu ilin kaj konservu en malvarmo.

### Vakstavola surmetajxo

El abelvakso oni povas fari ankaŭ vakstavolan surmetaĵon. Por tio oni prenu nature puran vakson (gajnitan el ne jam uzita ĉelaro) kaj puran kotonan tukon.

Uzado en naturkuracado: ĉe bronktito, tusado, malvarmumo, inflamo de urinveziko, reŭmataj malsanoj.

La vakstavolan surmetaĵon oni iomete varmigu ekz. per feno, metu senpere sur la haŭton kaj kovru per varma tuko. La varmon oni konservu dum unudu horoj per varmosako (varmo-botelo). Por pli fortigi la kurac-efikon oni povas meti sur la vakstavolan surmetaĵon kelkajn gutojn da lavenda oleo.

Ĉe incitema haŭto aŭ alergio kontraŭ abelproduktoj oni memkompreneble anticipe nepre konsultu kuraciston. Tio koncernas precipe alergiulojn kontraŭ florpolenoj.

### Kie aĉeti abelproduktaĵojn?

Ni proponas al vi rigardi la retbutikon de la aŭtorino je www.eweri.de.

# Gongksiao de Tradicia Ĉina Drogo (TĈD)

*De Wang Disheng, Ĉinio*

Gongksiao de tradicia ĉina drogo signifas la influon (aŭ afekcion) de la tradicia ĉina drogo kaj ĝian rezulton je homkorpo. La termino gongksiao strukturiĝas el la du latinaj vortoj de ĉinaj ideografiaĵoj: simple-dire "gong" signifas funkcion kaj "ksiao" efikon. Gongksiao tiamaniere signifas la funkcion kaj efikon aŭ funkci-efikon de la tradicia ĉina drogo,simplenomiĝe efiko.

La funkci-efiko aŭ efiko (gongksiao) de TĈD tiel formiĝis kiel induktiĝis laŭ homkorpa reakcio kontraŭ TĈD—ŝanĝo de sindromo aŭ fiziologio inter antaŭ kaj post apliko de TĈD kaj laŭ la fundmenta principo de bian zhengshizhi (distinga tutampleksa diagnozo kaj individuiĝa kuracado).

Alivorte la funkci-efiko (gongksiao) originis el praktikado kaj maturiĝis sub la direkto de la teorio de TĈM. La funkci-efiko de la drogo montras ĝiajn funkcion kaj efikon kaj nature rekte rilatas al ĝiaj indikoj.

El klinika vidpunkto, la funkci-efiko sugestas la indikon de la drogo en TĈM.

El konologio, funkci-efiko originis el la indiko de la drogo. Ekz. en kliniko oni trovis, ke ignamo povis kuraci la sindromojn de lien-stomaka debileco kaj tiun de pulm-rena debileco kaj ili resumis, ke ignamo havas la funkci-efikojn sufiĉigi ĉi-on kaj nutri jin-on, tonikumi lienon, stomakon, pulmon kaj renojn (el konologio). Rezone ili poste aplikas ĝin sur la malsanulo kun lien-stomaka debileco aŭ pulm-rena debileco (el klinika vidpunkto).

La termino pri gongksiao de ĉiu drogo, kvankam aspektas ĉiam lakona, sed estas la sinoptika esprimo.

### 1. Funkci-efiko (gongksiao) kontraŭ la Malsan-kaŭzo

La funkci-efiko de TĈD ofte konsistas vorte el la esprimo de verb-objekto. La verbo esprimas la agon de drogo kontraŭ malsano kaj la objekto ĉiam esprimas la malsan-kaŭzon, simptomon, homkorpan parton kaj ĝiajn funkcion aŭ materialon ( normajn aŭ patologiajn ). Ĝenerale funkci-efiko de TĈD inkludas la kvar flankojn: plifortigi zeng-ci-on ( similan al vera ci-o, kiu ĉi tie subtrekiĝas pri ĝia kontraŭmalsaneco ) elpeli patogenan aĉaĵon (patogenaĉaĵon), reguligi zangfu-organon kaj elimini patologian formitaĵon.

Konkrete apartenas al elpelado de la patogenaĉaĵoj, epurigi patogenajn venton aŭ malvarmon, forigi patogenan humidon, kvietigi febron (varmon), senigi tokson, mortigi paraziton, ellasi ekskrementon kaj urĝigi vomadon. Apartenas al plifortigo de zeng-ci-o, abundigi sangon kaj nutri jin-on, sufiĉigi cion kaj fortikigi jang-on. Apartenas al reguligo de zangfu-organo aktivigi sang-cirkulon, trankviligi menson, moderigi he-

pat-jangon, revoki konscion kaj subpremi konvulsion. Apartenas al eliminado de la patologiaj formitaĵoj, dispeli manĝitaĵan stagnon, elpeli tan-on (patologiajn formitaĵojn kiel mukaĵon) ,disigi stazon kaj forigi edemon.

Ekzistas intimaj rilatoj inter plifortigi zeng-ci-on, elpeli patogenaĉaĵon, reguligi zang-fu-organojn kaj elimini patologian formitaĵojn. Ili estas neniam izolaj aŭ absolutaj. Ĉar ili povas interinfluiĝi (interafekciiĝi) kaj intertransformiĝi. Ekz. patologiaj formitaĵoj mem povas pliseriozigi malsanojn, elvoki alian sindromon (malsanon), se oni praktikas elimini patologian formitaĵon el malsanulo, ili samtempe faras tiel kiel elpelas patologian aĉaĵon el la malsanulo. Tiamaniere eliminado de patologia formitaĵo egalas al elpelado de patogenaĉaĵo.

La kvar klasifikoj de funkci-efikoj kontraŭ malsankaŭzo konsistigas skelete kaj ĉefe la meĥanismojn de la drogaj funkci-efikoj, kiuj posedas direktecon al komprenado de la efiko de TĈD.

Plue la kvar flankoj de la funkci-efikoj povas altece abstrakte klasifikiĝi en la du kategoriojn: la tonikumo kaj eliminado. Inter ili plifortigi zeng-ci-on signifas plifortigi analeptikume aŭ nutre la funkcion de homkorpo, speciale tiun de kontraŭpatogeneco kaj apartenas al la tonikuma kategorio. Elpeli patogenaĉaĵon kaj patologian formitaĵon signifas elpurigi malutilaĵojn el homkorpo kaj ili apartenas al la eliminada kategorio. Reguligi zangfu-organojn povas plue subklasifikiĝi en la du kategoriojn — subpremi (nedirekte) hiperfunkcion de la zangfu-organo (en troeco) aŭ suplementi (fortikigi) hipofunkcion de la zangfu-organo (en malsuperec) , la unua el kiuj aparteras al la tonikuma kategorio kaj la dua al la eliminada kategorio.

La tonikumo kaj eliminado estas la du ĉefaj rimedoj de kuracado kaj ili adoptiĝas al la plejparto de malsanoj.

Ĝenerale atonia sindromo bezonas tonikumon, kaj malatonia sindromo bezonas eliminadon.

Sed atonio kaj malatonio estas ne absolute izolaj .

Por iu ajn malsano, atonia aŭ malatonia simptomoj eblas kunekzisti. Kiam la atonia simptomo elstaras grave, oni diagnosis ĝin kiel atonion kaj kiam la malatonia simptomo faras tiel, oni diagnosis ĝin kiel malatonion. Sed tio ne signifas la eksklusivecon ekzistantan inter ili.

Atonia kaj malatonia sindromoj povas impliki unu la alian. Ĉar atonia sindromo kaŭzas malsuperecan funkcion de la organo aŭ histo kaj eĉ deficitan potencon de ili, kio rezultas en superstaplon kaj stagnon de iliaj prilaborataj objektoj aŭ krudmaterialoj, kiuj indikiĝas kiel malatonia sindromo. Ekz. Se kor-ci-o estas deficita - ĝia funkcio estas karenca, sango elpumpenda el la koro staziĝas en atrioj kaj ventrikloj, kio indikiĝas la malatonia sindromo : nigreta vizaĝo, purpura lango, obtuza angoro ĉe antaŭkoro kaj anhelado ktp.

Same kiel tio, ĉar malatonio de iu organo aŭ histo ktp, je kiu troviĝas nenorma hiperfunkcio aŭ multaj patologiaj formitaĵoj ,eblas elkonsumi multe nutresencon kaj energion aŭ bari absorbadon de nutresenco aŭ energio, kio povas konduki la malatonian sindromon al la atoniaj.

Tio demonstracias la intiman rilaton kaj interŝanĝeblecon inter la atonia kaj malatonia sindromo.

Kiam ni kuracas atonian (malatonian) sindromon, ni devas ne neglektas eblan malatonia (atonian) sindromon. Kompreneble unu el tiuj ĝenerale estas ĉefa kontraŭstaro kaj la alia estas flanka (neĉefa) kontraŭstaro,kiujn ni devas distinge trakti.

Aplikante ĝusttempe ambaŭ tonikumon kaj eliminadon por kuraci malsanon, ni certe akiros pli bonan efikon.

Multaj famaj recipoj faris tiamaniere.

## 2. Funkci-efiko (gongksiao) kontraŭ la Simptomo

Iu ajn TĈD havas la du specojn de la funkci-efikoj, unu el kiuj estas kontraŭ malsan-kaŭzo kaj la alia el kiuj estas kontraŭ simptomo. TĈD kun kontraŭ-simptoma funkci-efiko funkcias kiel moderigi ( mildigi ) malsanan doloron. aŭ preventi pliseriozigôn de malsano ktp, kiel haltigi sangadon, moderigi doloron, kvietigi tusadon. haltigi vomadon kaj forigi febron ktp.

### Atributo de TĈD

La atributo de TĈD estas alteca resumado de ĝiaj fundamentaj ecoj kaj karakterioj kaj ankaŭ esprimiĝas kiel eco de TĈD.

La atributo de TĈD inkludas la kvar proprecojn, kvin gustojn, al-ĝin-kanaliĝojn, efik-direktojn kaj toksecon, kiuj strukturigas la kernon de la teorioj de TĈD.

Ĉitie oni devas distingi atributon de TĈD el fizika eco de ĝi. Fizika eco (formo, koloro, gusto kaj masivo ktp.) koniĝas simple depende de la homa sensorgano. Atributoj de TĈD resumiĝis kaj sciiĝis foj-refoje tra medicina praktikado — laŭ ŝanĝoj de homkorpo aŭ sindromo inter antaŭ kaj post aplikado de TĈD.

Frutempe oni komprenis primare atributon de TĈD tra obteni ĝian fizikan econ. Tamen sekve de foj-refoja praktikado, oni perceptis, ke atributo de TĈD ne tute konformas al ĝia fizika eco. Tio estas kiel antikva kuracisto opiniis, ke fizika eco de TĈD estis dotata de la naturo, kaj atributo de ĝi aldonata de la enklinika kuracisto.

La atributo de la drogo decidas (formas ) ĝian funkci-efikon kaj la funkci-efiko (efikoj) de ĉiu drogo estas konkreta kaj propra. Pri tio, konsultu koncernajn sekciojn.

1. proprecoj (Naturoj) kaj Gustoj de Drogoj

Iu ajn drogo havas sian proprecon, kiu formas unu gravan parton de funkci-efiko.

Proprecoj de la drogo inkludas malvarmon kaj malvarmeton, varmon kaj varmeton. Kompreneble la malvarmo kaj malvarmeto estas diferencaj nur en gradeco, kaj la varmo kaj varmeto estas ankaŭ.

La kvar proprecoj de la drogo estis resumataj laŭ iliaj diferencaj efikoj sur malsanoj aŭ laŭ diferencaj reagoj de homa korpo kontraŭ la efikoj de drogoj. Tiuj, kiuj povas kuraci varm-sindromon, estas jen la drogoj de malvarm-propreco aŭ malvarmet-propreco. Tiuj, kiuj povas kuraci malvarm-sindromon estas jen la drogoj de varm-propreco aŭ varmet-propreco. Kaj ankaŭ tiuj, kiuj povas havigi al homa korpo varmet-sindromon, estas la drogoj de varm-propreco aŭ varmet-propreco. Tiu, kiuj povas havigi malvarm(et)-sindromon al

homa korpo, estas la drogoj de malvarm(et)-propreco.

Do la propreco de drogo, varm(et)o aŭ malvarm(et)o, formiĝas nur kontraŭ malvarm(et)o aŭ varm(et)o de malsano aŭ sindromo.

En la distingo de sindromo de TĈM, la terminoj varmeco kaj malvarmeco funkcias kiel la kriterio, kiu manifestas naturon de sindromo aŭ malsano ,nome troan aŭ ekstreman faziĝon inter jin-o kaj jang-o. Malvarmeco rezultas el ekscesa jin-o aŭ insuficienca jang-o kaj varmeco el troa jang-o aŭ insuficienca jin-o.

Malvarmeco kaj varmeco en homkorpo devas esti en ekvilibro aŭ harmonia proporcio. Ekscesa jin-o aŭ jang-o, aŭ insuficienca jin-o aŭ jang-o ĉiam kaŭzas al homkorpo malvarmon aŭ varmon. Varm(et)o apartenas al jang-o kaj malvarm(et)o al jin-o. Jin-o kaj jango devas ankaŭ esti en ekvilibro aŭ harmonia proporcio. Se ili estas ne ekvilibraj, ni povas reekvilibrigi ilin tra utiligo de la jin-jang-a kontraŭeco.

La propreco de la drogo de varm(et)o aŭ malvarm(et)o utiliĝas juste por ekvilibrigi aŭ harmoniigi jin-jangon sub malsan-kondiĉo aŭ anormala stato

.Laŭ la teorio de jin-jang-o, varm(et)a drogo povas moderigi malvarm(et)an sindromon aŭ malsanon kaŭzitan de troa jin-o aŭ insuficienca jang-o. Malvarm(et)a drogo povas kvietigi varm(et)an sindromon aŭ malsanon el troa jang-o aŭ insuficienca jin-o.

Konkrete la drogo de malvarm-propreco aŭ malvarm-propreco funkcias kiel estingi patogenan fajron. kaj dispeli patogenan varmon, malvarmetigi sangon kaj senigi tokson. La drogo de varm-propreco aŭ varmet-propreco funkcias kiel varmetigi internaĵojn kaj dispeli malvarmon, pliviglligi vitalan fajron kaj plifortigi jang-on, varmigi ĝin-kanalojn kaj dragi luo-kanalojn, restarigi jang-on el kolapso.

## Laŭ Farmakologio de TĈD

La proprecoj de TĈD intime rilatas al la variaj fiziologiaj sistemoj kiel vegetativ-nerva funkcio, endokrina reguligo, homkorpa metabolo kaj centr-nerva sistema funkcio ktp.

### 1. Influo sur Vegetativ-nerva Sistemo kaj Endokrina Funkcio.

En kliniko, la patiento de varm-sindromo ofte prezentas en si mem la simptomojn: febro kaj sojfado, okul-inflamo kaj skarlatvizaĝo, ruĝ-lango kaj flava lang-tegaĵo, konstipo kaj flav-malmulta urino, kaj rapida pulso ktp. Tiuj patientoj ankaŭ akompaniĝas kun spirada rapidiĝo enbuŝ-temperatura altiĝo, saliv-sekreciada reduktiĝo. enurina-kateĉulmina malmultiĝo.

En kliniko, patientoj de malvarm-sindromo ofte prezentas en si mem la simptomojn: malvarmaj membroj kaj korpo, pala lango kaj blanka lang-tegaĵo, malkompakta fekaĵo, kaj multa kaj klara urino, malrapida pulso. Tiuj patientoj ofte akompaniĝas kun malalta baz-temperaturo, hipotensio, malmulta kateĉuamino (catecholamine) en urino ktp.

Krome patientoj de varm-sindromo ankaŭ havas la hiperfunkcion de la simpat-nerva kaj surren-glanda sistemo. Male patientoj de malvarm-sindromo havas hipofunkcion de la simpat-nerva kaj surren-glanda sis-

temo. Homkorpaj temperaturo, korbato, spirfrekvento, saliv-sekreciado, diastola sangpremo kaj sistola sangpremo estas la ses kvantaj normoj,kiuj povas reflekti la funkci-staton kaj mov-staton de la vegetative-nerva sistemo,en kiuj la efiko de drogoj sur la simpat-nerva sistemo certe enkonkretiĝos.

Eksperimentoj indikis,ke la drogoj kun varm(et)-propreco, kiel prilaborita akonito (Radix Aconiti Lateralis Preparata), seka zingibro (Rhizoma Zingiberis), cinamomo (Cortex Cinnamomi), kodonopso (Radix Codonopsis), astragalo (Radix Astragali) kaj makrocefala atraktilodo (Rhizoma Atractylodis Macrocephalae) donitaj al eksperimentaj ratoj, povis plirapidigi katajn korbatojn, plimultigi trinkadon de akvo kaj enurinan kateĉuaminon ktp.

La drogoj kun malvarm(et)-propreco, kiel anemareno (Rhizoma Anemarrhenae), koptido (Rhizoma Coptidis), skutelario (Radix Scutellariae), gentiano (Radix Gentianae) manĝigitaj al eksperimentaj ratoj havis la efikojn redukti konsumitan oksigen-kvanton, korbatojn, enurinan kateĉuaminon (catecholamine).

Eksperimentoj indikis, ke la drogoj kun varm(et)-propreco kiel (prilaborita akonito (Radix Aconiti Lateralis Preparata), seka zingibro (Rhizoma Zingiberis), astragalo (Radix Astragali) kaj ginsengo (Radix Ginseng) povis plialtigi la enkorpajn entenojn de dopamin-β-hidroksilaso,surren-glanda kortik-hormono, noradrenalino kaj dopamino de patientoj kun malvarm(et)-sindromo.

Studado trovis, ke la drogoj de varm(et)-propreco kaj malvarm(et)-propreco respective influis la funkcion de β-akceptantoj de la simpataj nervoj tra la du inversaj metodoj — unue drogoj kun la du proprecoj respective povis inhibicii aŭ eksciti la aktivecon de la βakceptantoj; due la drogoj de la du inversaj proprecoj povis respektive akceli aŭ reteni biologian sintesadon de β-akceptanta proteino.

### 2. Influo sur metabolan funkcion

La drogo de la varm(et)-propreco povas plialtigi konsumitan oksigen-kvanton kaj male tiuj de la malvarm(et)-propreco plimalaltigi la konsumitan oksigen-kvanton. Eksperimentoj indikis ke juna cervokorno funkcianta kiel la drogo de varm-propreco, povis plialtigi energian metabolon kaj konsumitan oksigen-kvanton en la cerbo, hepato kaj renoj de eksperimentaj ratoj kaj male la drogoj kun malvarm(et)-propreco, povis plimalaltigi konsumitan oksigen-kvanton de eksperimentaj ratoj kaj inhibicii la sintezadon kaj ellasadon de ilia tiroksino, kiu influas la proceson de enkorpa varm-produktado. La drogode malvarm(et)-propreco, kiel anemareno (Rhizoma Anemarrhenae), koptido (Rhizoma Coptidis), felodendro (Cortex Phellodendro) kaj rabarbo (Radix et Rhizoma Rhei) ktp. donitaj al eksperimentaj ratoj, povis inhibicii la aktivecon de Na+, K+-ATP kaj tiamaniere redukti konsumitan energion kaŭzitan el tiroksino.

### 3. Influo sur la funkcion de centr-nerva sistemo.

La multaj drogoj de malvarm(et)-propreco, kiel bova kalkulo (Calculus Bovis), sinteza borneolo (Borneolum Syntheticum) kaj skutelario (radix Scutellariae) havas la efikojn de sedativumo kaj kontraŭkonvulsio. La aliaj drogoj de malvarm(et)-propreco, kiel gipso (Gipsum Fibrosum), cinabaro (Cinnabaris) kaj magneto (Magnetitum)

ktp. havas la efikojn de kvietigo, kontraŭkonvulsio kaj inhibicio al centrnerva sistemo. Male drogoj de varm(et)-propreco havas la efikon plialtigi la eksciton de centr-nerva sistemo.

4. Influo sur kontraŭinfekton

Patogenaj mikroboj kaŭzas malsanojn, ofte estigante la simptomon de enkorpa varm-produktiĝo. La multaj drogoj de malvarm(et)-propreco, kiel koptido (Rhizoma Coptidis), skutelario (Radix Scutellariae), felodendro (Cortex Phellodendro), lonicero (Flos Lonicerae), forsitio (Fructus Forsythiae), pulsatilo (Radix Pulsatillae) kaj houtuinio (Herba Houttuyniae) havis la efikojn kontraŭ bakterio, fungo, viruso, tokson de bakterio kaj inflamo, kaj povis redukti korpan reagon al patogena materialo kaj enkorpan varm-produktiĝon.

Krom la drogoj kun la kvar-tipaj proprecoj, ekzistas ankaŭ la aliaj drogoj, kiuj havas ne la kvar evidentajn proprecojn — ili havas nek malvarm(et)-proprecon, nek varm-proprecon,sed la neŭtran (egalan) proprecon preskaŭ meze inter malvarm(et)-propreco kaj varm-propreco. Ili povas aplikiĝi por kuraci ne nur malvarm-sindromon, sed ankaŭ varm-sindromon. Tamen oni ankoraŭ kutime nomas la proprecojn de drogoj "kvar proprecoj", ignorante la kvinan proprecon.

# Nova hejmo de INA



La prezidanto de INA translokiĝos al Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo.

La nova adreso:
Hauptstr. 38, 37412 Herzberg, Germanio.